Ale już mię dzikus nie poznawał wcale,

Ukrył się gdzieś w krzakach, kwiatach,

[cieniu drzew.

A więc jeśli pieśń mą uchwycić się kusisz,

Tedy ją w przyrodzie, w życiu szukać

[musisz,

Bo mą pieśń ukryła nie księga, lecz wieś.

Pomiędzy motyle, muchy i szerszenie,

Gdzie nad lasem grają słoneczne promienie,

Moja pieśń swawoli ponad ziemią gdzieś.

Nie wiem, w jakim teraz masz ją szukać

[kraju,

Czy się gdzieś schroniła na brzegu ruczaju,

Czy do ciebie mruga gdzieś z pomiędzy

[wiech?

Czy się może stała kwiatkiem woniejącym,

I teraz ją niesie na sercu gorącym

Jakie piękne dziewczę w cień ubogich

[strzech?

Z oryginału Esperanckiego tłum.

Czesław Kozłowski.

JULIUSZ SŁOWACKI.

*Sort' min timigi jam povas nenia,
Vojon helklaran ĝis fino mi trovas,
Krei, dolori — jen estas viv' mia,
Tion mi faras, kaj pli — mi ne povas.*

*Iam — de amo feliĉaj roztagoj,
Torĉoj aliroraj, ĉieta safiro...
Pli gravaj estas hodiaŭ la agoj,
Grandaj, malgajaj, kiel sunsubiro...*

*Ilin pripensos venonta viv-horo
Kaj liberigos alaŭdon - spiriton;
Tiun alaŭdon helpu, Di - Sinjoro,
Ĝi flugu gaje en altan zeniton!*

Tradukis Juljan Tuwim

Glosoj al la mondlingva movado.

De D-ro Ernst Klimke.

Estas mirinde, kiom la homoj progresis. Tamen la homaro estas ankoraŭ tre malproksime de la supro de la kulturo; ĝi atingis apenaŭ la unuajn antaŭlastojn. Se oni konsideras la multajn centmilojn da jaroj, dum kiuj ĝi jam supreniĝis, tio ne estas multa, sed tamen pli ol oni povus supozi, se estus vere, ke kontraŭ malsaĝeco eĉ dioj vane batalas. La evoluemo de la homoj ja estas ankoraŭ pli forta, oni povas ĝin malakceli, sed neniam tute subigi.

Portantoj de la evoluemo, estas ĉiam nur malmultaj, la plimulto kontraŭlaboras ilin jam pro tio, ke ĝi pro kutimo kaj inertecon konservas la malnovon. La progreso estas ebla nur tial, ke la malnovo restas vere kutima ĉiam nur al unu aŭ malmultaj generacioj, dum la evoluemo efikas tra ĉiuj generacioj kaj iom post iom alportas la kutimiĝon al la novo.

* * *

Saĝeco kaj prudento ne estas io absoluta; ili estas dependaj de tempo kaj kutimo. Koncerne la tempon, la homoj estas samtempuloj nur laŭ la kalendaro, laŭ la cetero ĉiu vivas en la tempo, kiun li komprenas.

La homoj estas malsamaj, kaj pli multaj el ili vivas en la estinteco ol en la estonteco; nur tiu povas plene kompreni la estantecon, kiu iom antaŭiris ĝin.

* * *

De centoj da jaroj, de Leibniz ĝis Nietzsche, saĝaj viroj pensis pri la ebleco, forigi la malutilaĵojn de la multlingveco de la popoloj per artefarita ĝenerala lingvo interrilata, apud la gepatra lingvo. Kiam oni fine sukcesis, trovi en Esperanto tian lingvon, sufiĉantan

por ĉiuj prudentaj postuloj, la plimulto de la samtempuloj asertas, ke Esperanto estas maleblajo. Kaj de 25 jaroj centmiloj da homoj interparolas en tiu-ĉi lingvo, skribas leterojn, librojn kaj gazetojn en ĝi sur la tuta terglobo. Estas strange, kiel konvinkita oni povas esti pri imagita maleblajo, se oni ne volas konvinkiĝi pri la pruvita ebleco per propra pririgardo.

* * *

Sed pli malbonaj ol la malamikoj de novaĵoj estas kelkaj amikoj. La plej malbonaj estas tiuj, kiuj volas havi aŭ ĉion per unu fojo aŭ nenion.

La idistoj prave diras: Ne en la kreado de helpa lingvo sidas la ĉefa malfacilaĵo, sed en ĝia ĝenerala enkonduko. Sed samtempe ili postulas jam nun, antaŭ ol la ideo pri helpa lingvo ĝenerale enradikiĝis, plibonigojn de Esperanto, kiu estas aprobita kiel la sole praktika, nerefuteble elprovita solvo de la problemo. Neniu prudenta esperantisto asertas, ke la lingvo en ĝia nuna formo estas neŝanĝebla, neniam plibonigebla ideala formitaĵo. Ĉio homa estas neperfekta kaj submetita al ŝanĝoj. Sed ni havas ankoraŭ hodiaŭ nenium fervojon, se oni estus atendinta pri ĝia enkonduko, ĝis kiam estus plenumitaj ĉiuj deziroj, kiujn havis iu teknikisto, iu ekonomo, iu vojaĝisto. Neniu entrepreno povus esti efektigata, neniu artaĵo esti kreata, neniu ŝtato esti regatu, ja, neniu homo povus vivi, se ĉiam la deziroj de ĉiuj devus esti konsiderataj. Kiel estus eble, konstrui eĉ lingvon, uzeblan por ĉiuj popoloj, kiel estus eble, enkonduki ĝin ĉe ĉiuj popoloj, se ne nur ĉiu popolo, sed ĉiu profesoro dezirus ĝin havi laŭ sia gustol

* * *

La sangoplena suferovojo de la kulturo montras, kiom malfacile estas, akceptigi ĉe la homaro grandan ideon, kiu en la vivon alportas progreson por la bono de ĉiuj. La homoj malamas siajn bonfarantojn. Ekzistas tro multe da malsaĝejoj, kiujn ili blinde akceptas, ol ke ili havus tempon, mediti pri saĝaĵo. Nova modo el Paris, eĉ se ĝi estas tute malbela, akiras en mallonga tempo la tutan „kultur“—mondon. Kiel gajnite, tiel perdit. Ju pli valora io estas, ju pli daŭra la bono, kiun ĝi alportas, des pli malfacile ĝi sukcesas. Tial ŝajnas esti mirindaĵo, kion Esperanto atingis en la 25 jaroj de sia ekzistado. En ĉiu kulturpopolo ĝi trovis entuziasmitajn anojn, tiom libera ĝi estas de specialaĵoj, kiuj povus fari al ĉiu popolo, mi tute ne volas diri nevenkeblajn malfacilaĵojn, sed eĉ nur speciale maloportunan penon. En la Universala Esperanto-Asocio ĝi havas organizaĵojn, kiu ĉirkaŭas la tutan teron, en 60 landoj ĝi havas en pli ol 1500 lokoj reprezentantojn, kiuj estas kunigitaj en pli ol 2000 societoj, kaj ĝi havas gazeton de ĉirkaŭ du cent Esperantaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kies enhavo pritraktas ĉiujn aferojn de la homa vivo.

Ĉi-tiu sukceso estas atingita tute silente, sen ŝtata helpo, sen subteno per riĉaj monrimedoj, kontraŭ amasego da antaŭjuĝoj kaj malkomprenoj, kaj kontraŭ la grandega potenco de la ĉiutaga gazetaro, kiu ĝis la plej nova tempo kun malofta unuanimeco malakceptis la Esperanto-movadon aŭ plene silentis pri ĝi.

* * *

Ĉu oni serioze kredas, ke en tia grava afero de la homaro la helplingva ideo povus tiom sukcesi, se ĝi ne respondus al pli kaj pli urĝa bezono, se ĝi ne laŭ ĉiu rilato estus taŭga, kontentigi ĉi tiun bezonon, kaj se ĝiaj pioniroj spite de ĉiuj personaj interesoj ne estus kune agintaj en harmonia unuanimeco? Ĉiuj ekkonis, ke agiĝis pri granda valorajo; tial estis necese, unue konvinkigi la homaron pri la ideo, tial estis necese montri, ke io estas necesa kaj ebla, kio al multaj ŝajnis malebla aŭ neutila. Ĉi-tiu tasko estis kaj estas plenumebla nur -- ĉar bedaŭrinde ankoraŭ ne ĉiuj rezistoj estas venkitaj en ĉi tiu ĉefa punkto --, se oni pri la afero mem interkonsentis.

Ĉiu lingvo estas bazita sur interkonsento. Ĉe la lingvoj havantaj aĝon de jarcentoj, on-

estas devigata per la vivo de la lingvo kaj per ĝia historio, resti fidela al la interkonsento. La aliigoj okazas iom post iom laŭ tio, ke tie ĉi kaj tie, per ĉiam pli disvastiĝanta uzado, nova interkonsento estas metata en la lokon de la malnova. Sed kiel povus lingvo, kiu ankoraŭ ne havas historion kaj vivon, fariĝi reala lingvo, se oni ĝin ŝanĝus de tago al tago.

La kontraŭuloj de tielnomata artefarita lingvo estas pravaj, dirante, ke neniuj homoj sola povas krei lingvon. Kompreneble ne. Ĉar li nur povas elpensi sistemom kaj ne krei la interkonsenton, kiu la unue vivigas la lingvon. Sed kiam ĉi tiu nur ekzistas en sufiĉe granda rondo kaj estas fidele sekvata, ĝis kiam ĝi estos ĝenerale akceptita, tiam oni ne plu povas paroli pri artefarita lingvo. Per la uzado ĝi fariĝis vivanta lingvo, kiu nur havas alian historion ol la tielnomataj naturaj lingvoj, kiuj ja ankoraŭ ne sukcesis kiel la arboj, sed kiuj estas kreaĵoj de la homa spirito, kreaĵoj de silenta interkonsento.

* * *

Estas nur kelkaj grandaj scienculoj, sed malgrandaj praktikuloj, kaj diras: „Esperanto estas al ni ne sufiĉe perfekta.“ Kvazaŭ agiĝus ankoraŭ pri nura sistemo, kaj ne jam pri vivanta lingvo!

Ili staras antaŭ granda, per longa laboro konstruita urbo kun bone evoluinta vivo kaj nepre kontentaj loĝantoj kaj postulas, ke la urbo estu malkonstruita, ĉar kelkaj stratoj pli oportune, kelkaj placoj pli bele povus esti aranĝitaj. Kaj al la loĝantoj ili diras: „Forloĝiĝu!“ kaj al tiuj, kiuj deziras enloĝiĝi: „Restu ekstere kaj venu al ni!“ Sed se ili estas demandataj: „Kion pli bonan vi donas al ni?“ ili ne povas montri urbon, sed nur planojn, kaj ĉiu el ili havas alian planon, laŭ kiu li deziras konstrui sian urbon.

Ekzistas homoj, kiuj ne vidas la urbon pro la domoj.

Estas pli facile, fari dek planojn, ol efektiviĝi unun. Dum Esperanto per si mem atingis la vivantan uzadon, staras dekduoj da sistemoj, kiuj en la okuloj de siaj elpensintoj estas pli bonaj, nur sur la papero.

* * *

Internacia helplingvo, kiu devas vere plenumi sian taskon, povas esti nur unu, aŭ ĝi tute ne estos. Proponi plibonigojn, kondukantaj al skismoj, antaŭ ol lingvo estas ĝene-

rale akceptita, ja, antaŭ ol ankoraŭ entute ĝeneraliĝis la konvinko pri ĝia ebleco kaj neceseco, kaj defendi la tiamaniere aperantajn sistemojn kiel dialektojn, kiuj sin reciproke ne bezonus kontraŭbatali, tio estas plena nekompreneo de la celo de la afero. Laŭ la ĝis nun atingitaj sukcesoj de Esperanto estas ne supezeble, ke iu pretekstita plibonigo kiel memstara sistemo forpuŝos Esperanton. Eĉ efektivaj plibonigoj povus koncerni nur relative malgravajn detalojn. Kaj se la estonta uzado tie ĉi kaj tie postulas ŝanĝon, ekzistas sufiĉe da vojoj ĉe internacie enkondukita lingvo, por fari tiajn ŝanĝojn, ne detruante la tutan, ĝistiaman konstruaĵon. Neniu esperantisto dubas pri tio. Sed la kontraŭuloj, la

indiferentuloj, aŭ la amikoj de la ideo, ne posedantaj spertojn pri Esperanto, entute ĉiuj, kiuj ne scias, kio estas Esperanto kaj en kia grado ĝi jam fariĝis netaksebla kulturfaktoro, kion ili diras? „Ni atendos, ĝis kiam unu aŭ la alia sistemo estos ĝenerale akceptita; unue la amikoj finu sian disputon inter si.“

Kaj per tio perdiĝas valora tempo, valoraj fortoj estas malsparataj en senprofita kaj malutila batalo, kaj la progreso povas esti haltigata je generacioj.

Kiu antaŭmetas al la nepre unue atingota ĉefa celo bagatelajn personajn dezirojn, kiuj krom tio estas malsamaj de homo al homo de popolo al popolo, tiu faras krimon kontraŭ la kulturo.

Trad. F. Ellersiek laŭ „*Germ. Esperantisto*“.

9a Universala Kongreso de Esperanto.

Genova, 7—14 Septembro 1913. Adreso: Kongreso de Esperanto, Genova (Italujo).

La Jubilea Kongreso apartenas al la historio de Esperanto, sed sur la horizonto de la Esperanta ĉielo brilas de malproksime la leviĝanta stelo de la Nŭila Kongreso, multon promesanta.

Genova, „La Superba“ (belega), la ĉefa komerca urbo de la bela Italujo komencas sin prepari por gastame akcepti la multenombrajn samideanojn el ĉiuj nacioj, kiuj, tie ĉi kunvenante, forte helpas la movadon de Esperanto en nia lando. Nia laboro estas grava kaj malfacila; por vidi la fruktojn de ĝi, ni devas pacience atendi ĝis la fino de l' kongreso.

Nia kara lingvo tro similas al la itala lingvo kaj la italoj preskaŭ ne kredas, ke Esperanto estas same facila por la aliaj nacioj. Multege da fremduloj ĉiujare vizitas nian landon, sed ili parolas aliajn lingvojn, pro kio la italoj estas devigitaj lerni multajn lingvojn. Tiamaniere vi facile rekontos kelnerojn, gvidistojn, veturigistojn, vendistojn kaj aliajn, eĉ tre modestajn personojn, kiuj tre facile parolas france, hispane, angle, germane. Precipe la Genovanoj, kiuj multe vojaĝas eksterlanden, tre bone scias fremdajn lingvojn. Do por la plej multaj el niaj estontaj karaj gastoj estas tre facila afero, veni al Genova. Ili ne sin trovos, kiel en Kraków, en la komika situacio, ne povi sin interkomprenigi kun la loĝantoj de la urbo, ĉar tie ĉi la plej simplaj personoj povas ilin alparoli en iu lingvo, al ili iomete konata. Sed Esperanton niaj loĝantoj ne sciopovas, kaj tamen ili ĝin komprenas, ne sole

pro la simileco al la itala lingvo, sed ankaŭ pro la ioma sciado de aliaj lingvoj.

Tamen, la unua konsilo, kiun mi donas al ĉiuj niaj karaj vizitantoj, estas, ke ili dum sia estado en Genova parolu kun ĉiuj personoj, kiujn ili renkontos, ne alian lingvon ol Esperanton. Mi ilin certigas, ke se ili parolos malrapide en Esperanto, preskaŭ ĉiuj loĝantoj ilin komprenos, kaj tiel en unu semajno la tuta urbo estos esperantigata. Dum la kongresa semajno la intereso de ĉiuj loĝantoj pri nia afero tre forte kreskos, kaj la praktika pruvo estos farata. La kongresanoj revenos en sian landon, rakontante, ke per Esperanto estos jam eble vojaĝi en Italujo, kaj la Genovanoj rakontos al ĉiuj italoj, ke per Esperanto ili sin interkomprenigis kun personoj el ĉiuj nacioj, preskaŭ ne studante la helpan lingvon. Do ni preparu nin por grava eksperimento.

De ĉi tiu momento, karaj samideanoj de la aliaj nacioj, preparu vin vidi Italujon marŝanta en la unua vico en la movado por nia lingvo. Dume ni preparas por vi agrablan programon. Pluvon ni ne promesas al vi, sed belan, brilantan sunon. La varmo ne estos granda. Komence de septembro la tagoj jam estas pli mallongaj, vespere kaj matene la aero komencas esti pli freŝa. Aliparte ankaŭ dum la plej varmaj someroj, la termometro ne superas 30 gradojn laŭ Celsius. Krome ne forgesu, ke Genova estas marurbo, kaj se vi deziras, vi povas vin agrable bani en la bela blua maro. La komitato preparos por vi eks-

kurson sur la maro, kaj mi certigas, ke dum la monato septembro la maro estas trankvilega, eĉ la plej delikataj fraŭlinoj povos ĝin toleri. Interesa itala komedio estos prezentata, kaj itala muziko estos ludata. Venezianan vesperon ni preparos sur la maro, kaj ni estas certaj, ke vi ĉiuj kunportos de via restado en la urbo la plej ngrablajn neforgesoblajn impresojn. Plue ni zorgos, ke karavanoj estu organizataj por la vizitado de aliaj belaj de Italujo. Tiuj ĉi estu nur la unuaj informoj. La venotajn monatojn mi pli detale raportos.

Por nun mi petas en la nomo de la komitato, ke ĉiuj rapidu, sendi al ni sian aliĝon kun la kotizo por la kongreso (6 Sm.). Al ĉiuj, kiuj de nun pagos la kongresan kotizon, ni sendos la gazeton „*Itala Esperantisto*“, kiu estos la oficiala organo de la 9a Kongreso. Per tiu gazeto ĉiuj kongresanoj estas plene informataj pri la prepara laboro de la kongreso, pri la laboroj de l'kongreso mem kaj tiamaniere ĉiu povus veni al Genova bone informita.

La komitato intencas bone aranĝi kaj organizi la fakajn kunsidojn tiamaniere, ke estos eble, preskaŭ organizi verajn specialajn kongresojn, en kiuj oni diskutos kaj decidos gravajn demandojn de internacia graveco pri la plej diversaj profesioj aŭ ideoj de la kongresanoj. Ni petas ankaŭ, ke la kongresanoj baldaŭ decidu kaj nin informu pri la laboroj kaj pri la temoj, kiujn ili intencas diskuti en tiuj gravaj fakaj kunsidoj. Ni devas nun komenci praktike apliki Esperanton, kaj en tiu praktika urbo ni devas doni praktikajn pruvojn de la perfekta uzebleco de Esperanto.

La germanoj, la angloj kaj la amerikanoj bone jam konas la alogaĵojn de nia ĉarma „Riviera“. Ĝi kuŝas tute proksime de Genova, kaj eĉ gravaj lokoj estos facile atingeblaj de Genova per tramveturilo. Sub la blua ĉielo de Italujo ni multenombre kunvenos la venontan Septembron por praktike komenci praktikan agadon por kaj per Esperanto.

Vulkano.

la 5a Internacia Kongreso de Komercaj Ĉambroj.

Dum la kunveno de la Komercestoj de nia Oka en Krakovo, mi anoncis, ke mi intencas partopreni la *Kvinan Kongreson de Komercaj Ĉambroj*, okazantan en Bostono, Massachusetts, de la 23a ĝis 28a de Septembro, kiel delegito de la Pola Societo de Komercestoj en Varsovio. Oni opiniis, ke tio estos bona okazo por propagandi Esperanton, kaj esprimis la deziron, ke mi faru oficiale proponon akcepti Esperanton, kiel unu el lingvoj, kies uzado estas rajtigita dum la kunvenoj de la Kongreso. Mi plezure akceptis la proponon kaj uzis la tempon dum la longedaŭra vojaĝo trans la Atlantika Oceano por prepari konvenan paroladon pri Esperanto en lingvo angla.

Vojaĝante Bostonon el New Jork kun aliaj delegitoj mi tre ekĝojis, kiam mi vidis la sekvantan anoncon publikigitan en diversaj Bostonaj ĵurnaloj, kiujn oni disdonis en la vagonaro:

„New England Telephone...“

Malsupre sekvis en lingvo esperanta:

„Ĉar 47 landoj estas reprezentantaj de siaj delegitoj dum la Internacia Kongreso de Komercaj Ĉambroj ŝajnas al ni konvena prezenti al ili nian saluton en la internacia lingvo Es-

peranto k.t.p. La traduko angla estas jena.“ (Sekvas la traduko.)

La ideo mem, ke oni uzis Esperanton por esprimi tiun ĉi saluton estas sufiĉa pruvo, ke la Usonoj landanoj serioze traktas nian lingvon, kvankam ili certe ne multe sentas ĝian bezonon. Dum la vizito en Ameriko mi konvinkiĝis, ke kvankam Esperanto ne kalkulas en Usono multajn adeptojn, kiuj aktive agadus por via disvolviĝo, tamen ĝi (certe) havas tie multajn amikojn. La aliaj, kiuj indiferente rilatas nian ideon, havas sufiĉe da intelekto kaj takto por ne juĝi la tutan aferon negative, sen studado ĝin antaŭe.

Aliparte la esperantistaro devus tre ĝoji pro la posedo de homoj tiel kleraj kaj sindonaj, kiel la geedzoj Reed el Washington kiuj decidis la tutan sian vivon dediĉi al la disvastigo de Esperanto en Usono.

La ĝojo, kiun mi sentis, leginte la anoncon de la Nev-Jorka Telefona Kompanio, donis al mi pli da fervoro por mia parolado. Sed bedaŭrinde, ĝi ne povis okazi. Kiel klarigis al mi la sekretario de la Kongreso, (al kiu mi prezentis mian komis-leteron de la sekretario de la Centra Oficejo kaj de la Oka en Krakovo), dum la kongreso de Komercaj Ĉambroj

estas permesite paroli nur pri aferoj, antaŭe deklaritaj kaj presitaj en la programo. Tiamaniere mia afero estis detruita kaj mi ne povus fari mian paroladon dum tiu ĉi Kongreso. Tamen, mi intencas ĝin deklari dum la sekvonta Kongreso, kiu okazos en la jaro 1914 en Eŭropo.

Ne povante oficiale paroli pri Esperanto, mi tamen laŭpovo propagandis ĝin. La fakto mem, ke la Esperantistaro havas sian delegiton, portantan la verdan stelon en ĉiuj okazoj, dum la plej solenaj festenoj, sendube kaŭzis utilan efekton. Per helpo de S-ro Reed, sekretario de la Centroficejo de la N. Am. E. A. kaj S-ro Payce, prezidanto de la N. Ang. E. A., kiuj ankaŭ partoprenis la Kongreson mi kaŭzis, ke oni parolis pri Esperanto tie ĉi kaj tie, kaj mi trovis, ke multaj interesiĝas pri Esperanto, sed domaĝe preskaŭ ĉiuj estas tro mallaboremaj por entrepreni ĝian ellernadon.

Krom tio, mi havis malgrandan paroladon pri Esperanto dum unu festeno privata en la

Bostona City Club. Mi parolis rilate al Barcelono, kiu invitis la sekvantan kongreson de Komercaj Ĉambroj. Mi rekomendis akcepti la invilon de Barcelono dirante, ke kiel partopreninto de la Kvina Internacia Kongreso de Esperanto, kiu okazis en tiu ĉi urbo, mi povas certigi, ke ĝi estas gastama k. t. p. kaj mi uzis ankaŭ la okazon por rakonti pri la naturo, uzado kaj disvolviĝo de Esperanto. Mi plezure konstatas, ke la aŭskultantaro estis vere internacia, kaj ke oni laŭŝajne min aŭskultis kun granda intereso.

Post la Kongreso mi estis prezentita, kiel esperantista delegito, al s-ro Woodvon Wilson, nuna Prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko.

Antaŭ la fermo de kongreso ni, esperantistoj kaj samideanoj, kunvenis por adiaŭo iri kaj mi proponis esprimi nian dankon al la Nov-Angluja Telefona Kompanio, por ĝia esperanta saluto. Oni subtenis la ideon kaj komisiis al mi skribi leteron.

Jerzy Loth.

Scienco kaj vivo.

Statistiko de vertebraj animaloj.

Unu eksterlanda ĵurnalo provas kalkuli la nombron de ĉiuj vivantaj nun specoj de vertebraj animaloj. Jen ĝiaj deduktoj:

	nombro de specoj
1. Suĉbestoj	7,000
2. Birdoj	20,000
3. Rampobestoj:	
Krokodiloj kaj testudoj	300
Iacertoj	3,300
Serpentoj	2,400
4. Amfibioj:	
Ranoj	2,000
Salamandroj	200
5. Fiŝoj	12,000

Projekto de nova kalendaro.

1916

Tago de Nova Jaro

Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro.

Dimanĉo	1	8	15	22
Lundo	2	9	16	23
Mardo	3	10	17	24
Merkredo	4	11	18	25
Ĵaŭdo	5	12	19	26
Vendredo	6	13	20	27
Sabato	7	14	21	28

Por plisimpligi la kalendaron, kiu estas diversa ĉe diversaj nacioj, S-ro Bojdom proponas jenan projekton. Li proponas kalkuli anstataŭ 12 monatoj, dektri. Ĉiu monato konsistas el 4 semajnoj, kaj ĉiu semajno el 7 tagoj. Tiamaniere simpla jaro konsistos el 364 + unu-tago, kiu ne apartenas al iu monato kaj ne havas nomon de iu tago de semajno. Ĝi estos antaŭ la komenco de januaro kaj nomigos tago de Nova Jaro. Por superjaroj oni aldonas al fino de decembro unu tagon (366-a) ne apartenanta al tiu ĉi monato kaj ne hav-

Kun tiu-ĉi n-ro estas dissendataj:

- 1) Senpaga literatura aldono por 11-duonjaro de k. j. — „Ŝi, la Tri“
- 2) Prospekto de P. E. por 1913 j.
- 3) Prospekto pri Ĝarden - Urbo Esperanto.

anta nomon de iu-tago de semajno kaj nomota fino de superjaro.

La projektatan kalendaron oni povas al si prezenti laŭ la tabelo.

La simpleco de tiu kalendaro estas evidenta. Ĉiu monato kaj ĉiu semajno komenciĝas per dimanĉo kaj finiĝas per sabato.

Por antaŭe scii la daton, de iu-tago de semajno sufiĉas scii aŭ la daton aŭ la tagon. La laboro de nia memoro pli faciligās kaj la simpleco de la kalendaro estas ideala.

Sur la tabelo troviĝas la j. 1916. Ĝis tiu tempo Bojdomesperas, ke la demando pri kalendaro estos feliĉe solvita.

Ĉu oni povas eviti timon?

Unu el la plej eminentaj pensuloj Descartes diras: „Por vekti en si kuraĝon kaj eviti timon, ne sufiĉas havi volon, sed oni devas lernigi sin kompreni la kaŭzojn kaj pripensi la ekzemplojn, kiuj povas nin konvinki, ke la danĝero ne estas tiel granda, ke defendo estas ĉiam pli fidinda, ol forkuro.

J. V—iĉ.

Konsideru!

La homoj ne estas tiel bonaj, kiel prezentas ilin amikoj, kaj ne tiel malbonaj, kiel ilin prezentas malamikoj.

(Knigge.)

La konscienco estas la leĝo de leĝoj.

(Lamartine.)

Sufiĉas ĉiutage krii pri danĝero, kaj danĝero venos.

(Zola.)

Tiu, kiu opinias, ke per mono oni povas ĉion fari, estas ankaŭ kapabla por mono ĉion fari.

(Buast.)

Tiu, kiu aĉetas malnecesajojn, baldaŭ vendos necesajojn.


(Franklin.)

Feliĉokaze ĉiuj filozofoj havis malbelajn edzinojn, ĉar se ili havus belajn edzinojn, ili forgesus pri la filozofio.

La plej potenca el ĉiuj regantoj estas virinĉo.

(Ibsen.)

Martin Schleyer †.



Martin Schleyer atingis aĝon de 81 jaroj, kaj strange estas, ke li ĝuste mortis dum nia jubilea kongreso, kiam nia lingvo Esperanto havis novajn triumfojn; lia morto okazis la 16an de Aŭgusto en Litzelstetten apud Konstanz kaŭze de renmalsano.

La meritojn, kiun Schleyer akiris per la kreo de mondlingvo, estas sufiĉe konataj. Volapük estis la unua taŭga artefarita lingvo, kiu multe disvastiĝis. Poste ĝi iom post iom devis cedi al la potence progresanta Esperanto-movado, ĉar Esperanto laŭ multaj rilatoj superis la sistemon de Schleyer.

D-ro Zamenhof honoris la elpensinton de Volapük en siaj verkoj kaj paroloj ĉiam kiel plej eminentan pioniron por la ideo de ĝenerala helplingvo, kaj li esprimis tion ankaŭ en sia parolo pri Schleyer en la lasta kunsido de la Oka kongreso. Ankaŭ de la tuta esperantistaro la mortinto estis alte ŝatata, kiel apostolo de lingvo internacia.

Ankaŭ sur aliaj kampoj Martin Schleyer faris fruktodonan laboron. Li estis treege instruita homo, li posedis pli ol 80 lingvon kaj verkis multege da valoraj libroj pri la plej diversaj temoj. Paco al li eterna!

La konata diro, ke tiu ankoraŭ longe vivos kiun oni opinias mortinta, ne plenumiĝis ĉe la elpensinto de Volapük, prelado Martin Schleyer. Jam en la pasinta jaro oni erare anoncis lian morton, sed nun li efektive devis forlasi nian teron, kie li kun granda fervoro kaj nelacigeble laboris por la bono de la homaro.

El Esperanta Mondo.

Paca Kongreso. — Ĉar la internacia lingvo povos esti potenca ilo por firmigi la konsenton de la popoloj, oni ne miru ke multaj pacifistoj estas, pli aŭ malpli ageme, partianoj de Esperanto. En la Paca Kongreso en Genevo la Esperantistoj decidis organizi feston en la Hotelo Bellevue. Tiu manifestacio rapide improviziĝis kolektis, la vendredon 28 Septembro, ĉirkaŭ 80 anojn, kaj certe iom revivigos nian movadon en Genevo.

Salutis unue la ĉeestantojn S-ro Moscheles, Prezidanto de la Internacia Asocio por Arbitrado, poste S-ro H. Hodler eldiris bonegan paroladon por Esperanto, memorigante la gravan rolon estontan, kaj aludante la jam utilajn servojn de la U. E. A. D-ro A. Gieswein priskribis la internacian kongreson katolikan en Budapeŝto; oni aŭdas ankoraŭ S-in Biske, kolonelon Pollen, S-inon Severine, S-ran Gabriel Chavet kaj S-ran Fried. Fine S-ro René de Saussure, tre aplaŭdata, esperas, ke la proksima Nobel'a pacpremio estos donita al D-ro Zamenhof.

Cifera muziko — Ĉiujn klarigojn pri tiu tre interesa muzika sistemo, tre facilmaniere adaptita por kantado kaj ludado — donas esperanta broŝuro „Cifera Muziko,“ ricevebla

je prezo 1 ekz — 6 sd., 10 ekz. — 40 sd. ĉe la Societo Galin-Paris-Chevė, 36 rue Vivienne, Paris.

Universala Esperanto Asocio informas nin per oficiala bulteno, ke la tri proponoj pri la financa reformo de U. E. A., submetitaj al la ĝenerala voĉdonado per la lasta Oficiala Bulteno estis akceptitaj per 69 voĉoj kontraŭ 14 (vidu protokolon en Esperanto de 20. oktobro, Oficiala Informilo de U. E. A.).

Konsekvenco, la membra kotizajo por U. E. A. estas fiksita je 1 Sm., el kiu la Delegito sendos 80 sd. al la Centra Kaso kaj konservas 20 sd.

La kotizajo por 1913 estas de nun pagebla.

Fakaj kotizajoj. — Por 1913 ekzistis interne de U. E. A. la jenaj specialaj fakoj: Universala Interŝanĝa Asocio (Interŝanĝa fako), Universala Virina Asocio (Virina fako), Universala Laboristo Asocio (Laborista fako).

Tiuj fakoj jam ekzistis la lastan jaron. Krom tio estis kreita nova, sub la nomo: Universala Studenta Asocio (Studenta fako).

La jara kotizajo por ĉiu fako estas 50 sd. Ĉiu membro de fako devas esti samtempe membro de U. E. A. por la kuranta jaro.

Esperanto na scenie operowej.

(Głosy prasy obcej).

L'Eclair (Dziennik paryski) pisze:

„Błogosławieni niech będą za odważną inicjatywę, organizatorzy Kongresu w Krakowie! Opera po esperancku, mój Boże, co za zachwaleń! Widziano dotąd dramat, tragedję po esperancku, ale nie ośmielono się wystawić opery.

„Dla uczczenia jubileuszu nic nie wydało się niemożliwym Krakowianom, z odwagą graniczącą może z lekkomyślnością postanowiono odtworzyć *Halke*, popularną operę polską.

„Szczęście sprzyja zuchwałym, mówi przysłowie, sprawdziło się ono całkowicie w tym wypadku. Przedstawienie było zupełnym tryumfem zarówno dla aktorów, jak i dla tłomacza.

„Halka jest bardzo mało znaną we Francji, prawdziwa szkoda. Kongresowi krakowskiemu zawdzięczam tę niezwykłą ucztę artystyczną. Wielu z mych towarzyszy podobnie jak i ja bez kongresu esperanckie-

go nie miałoby sposobności zapoznania się z arcydziełem muzyki polskiej.

„Muzyka Halki wydaje się już nieco przestarzałą, nie mniej przeto niepodobna oprzeć się czarowi melodji ludowych. Charakter polski i typy narodowe zachwycają nas w tym utworze. Szczególnie oklaskiwano akt trzeci i czwarty, stanowczo najlepsze. Taniec górall i narodowy „mazur“ cieszyły się największym powodzeniem. Zakończenie jest niezwykle piękne i wzruszające.

Wykonanie ponad wielkie pochwały. J. Mucclinger (stolnik). S. Marynowiczówna (Zofja) i Ogrodzka (Halka) nie ustępują w niczym naszemu wielkim aktorom. Specjalnie szczęśliwym był wybór A. Okońskiego jako Janusza; jest to jeden z najwybitniejszych aktorów nowożytnych—oklaskiwano już go nieraz w Niemczech i Włoszech.

P. Okoński nie mówi jeszcze po espe-

rancku, roli swej musiał się uczyć z wielkim pośpiechem, mając moc innych zobowiązań.

— Cztery dni wystarczyły mi — mówił do mnie po przedstawieniu — ażeby czytać, wymawiać prawidłowo Esperanto i nauczyć się roli. Uważam, iż Esperanto jest nadzwyczajnie łatwe, szczególnie dla nas, Polaków, mających te same zasady wymowy. Mam nadzieję, iż nauczę się go w krótkim czasie; odda mi ono niewątpliwie olbrzymie usługi w mych występach gościnnych. Spodziewam się mówić już biegle po esperancku, gdy za parę miesięcy przyjadę do Paryża.

„Wracając do Halki, będę chyba wyrazić ciem opinii ogólnej, gdy powiem, iż Esperanto doskonale harmonizuje z muzyką. Wyda się to może wielu dziwnem, ale libretto esperanckie jest łatwiejszem do uchwycenia i zrozumienia, niż w narodowych językach.

Marcel Genermont.

Neue Freie Presse (wielki dziennik wiedeński).

„...Kiedyś było wątpliwem pytanie, czy Esperanto jest zdolnem do odtwarzania dzieł literatury pięknej. Wystawienie Goethego „Ifigenii z Taurydzie“ podczas kongresu w Dreźnie, Szekspira „Jak wam się podoba“

w Waszyngtonie, Pawła Staaka „Kaatje“ w Antwerpii i Słowackiego „Mazepy“ w Krakowie, odpowiedziało wielokrotnie twierdząco na to pytanie. Po dźwięcznem, jasnem odegraniu „Mazepy“ przez najlepszych aktorów polskich zewsząd rozległy się głosy: „Dzisiaj Esperanto jest bezwątpienia żyjącym językiem“.

„Iż tak jest w istocie, pokazywało głębokie wzruszenie, z jakim wszyscy widzowie śledzili dramat, rozgrywający się na scenie.

„Następnego dnia zebrali się Esperantyści na narodowej polskiej operze „Halce“. Było to pierwsze przedstawienie operowe w sztucznym języku. I znów Esperanto święciło tryumf. Wykonanie dowiodło niezbiecie zdolności Esperanta do współdziałania w wykonaniu dzieł muzycznych. Nie będę nawet usiłował opisywać oklasków, mógłbym dać bowiem słaby tylko obraz ogólnego, bezgranicznego zapалу i wzruszenia“.

* * *

A teraz czytelnicy, zestawcie te dwa głosy ze słyszanyymi zarzutami, iż przedstawienia esperanckie ośmieszają arcydzieła polskie i wystawią je na śmiech obcych.

Korespondająj.

Łódź. Por vigligi movadon en nia societo, La Komitato invitis anojn kaj gastojn al ĝenerala kunveno. Kolektiĝis kelkdekoj da personoj, kiuj kun granda intereso aŭskultis raporton de D-ro A. Goldenberg pri la Oka, ilustritan per fotografiaj kaj multaj afiŝoj, broŝuroj — memorajoj el Krakova Kongreso.

Postsekvis elekto de estra komitato kiu nun konsistas el jenaj personoj: S-ro *Fr. Ender* — prezidanto, D-ro *A. Goldenberg* vic prezidanto, S-ro *S. Żerański* — kasisto, S-ro *K. Miłkołajczyk* — sekretario kaj F-ino *Grahowska* bibliotekistino; S-ro *Męcina* — mastro.

En multaj lokoj estas metitaj anoncoj pri kursoj en nia societo, kiuj estas komencotaj en novembro.

Gazetoj lodzaj ne malfavoras jam nian aferon. Tre volonte presas pri esperantaj novajoj „Gazeta Łódzka“, bone redaktata de S-ro Grodek.

Ag.

Kalisz. Dank'al S-ro *B. Szczepankiewicz*, prezidanto de Kalisza Societo „Lumo“, la 1an de Novembro estis aranĝita la unua parolado

kaj malgranda ekspozicio de esperantaj en ĉambrego de loka muzika societo.

Prezo de biletoj estis tre modera (10 — 50 kop.) kaj al ĉiu bileto estis aldonitaj propagandaj folioj malavare donacitaj de S-ro *Lustig*.

Parolanto S-ro *Henryk Przybylski* skizis historion de la provoj de lingvoj tutmondaj kaj pli longe rakontis pri Esperanto, klarigante al aŭskultantoj ĝian genian konstruon, taŭgecon en internaciaj rilatoj kaj vivkapablecon.

En fino S-ro Przybylski deklamis pole kaj esperante baladon de Mickiewicz „Vojevodo“ (Czaty).

Ĉeestantoj (ĉirkaŭ 150 da personoj) dankis al la parolanto per aplaŭdoj. En sekvanta tago ekspozicio estis fotografiita.

Esperanta movado en Kalis progresis ĝis nun reziste, sed evidente estas, ke multe da personoj en lasta tempo interesiĝas je Esperanto kaj intencas ellerni la lingvon.

„Lumo“.

la lastaj oferdonacoj por literaturaj konkursoj.

Ekster la listo anoncita en № 8 de P. E. ni ricevis ankoraŭ mondonacojn por konkursoj premioj de sekvantaj personoj.

D-ro Gelibter el Zamość 4 rb.; S-ro Radzyński el Zaporozje rb. 3,00; S-ro S. Szulc el Łódź rb. 1,50;

En Fort Wayne (Usona) kolektis por la premioj S-ino *Morja Jungton* 22 rb. 35 k. laŭ sekvanta listo: 2-dolarojn: S-ina M. Juugton, po 1 dolaro, S-oj Jan Jungton kaj A. E. Zidek; po 50 centoj: S-ro W. Kowalewski, H. J. Ordon kaj F. Zdowczyński; po 25 centoj: S-ro W. Jungton, O. Junkton, T. Belbutowski, J. Strzałkowski, F. Morga, R. Belbutowski, E.

Drozdowski, W. Zdawczyński, J. Kieszkowski, C. Holland, R. Eckstein, A. Wiśniewski, A. Kozbiał, R. Sawicka, S. Strzałkowski, J. M. O.Campo, S. Rozpędowski, K. Lubrańska, J. Jarkiewicz, B. Pawłowski, K. Kryniewiecki, P. Sadowski, K. Rausch kaj Nast.

Ensume 4 rb. + 3 + 1,50 + 22,35 = rb. 30,85.

Ĉiujn oferdonintojn ni tre dankas kaj speciale esprimas nian tutkoran dankon al S-ino Marja Jungton el Ameriko, kiu ne ŝparis klopodon kaj kolektis la monon inter poloj-samideanoj en Nord-Ameriko. Ni ĝojas, ke nia alvoko eĉ tiel malproksime trovis eĥon en la koroj de niaj karaj samideanoj.

Bibliografio.

Historio de la lingvo Esperanto. *Edmond Privat.* Privat-Docento ĉe Geneva Universitato. Unua parto 1887 — 1900. Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse, Genève (Svislando). 1912. Paĝoj 54. Prezo bindite s^{fr} 0,50.

La ĉirkonstanco, ke Esperanto festis en tiu ĉi jaro la dudekkvinan datrevenon de sia naskiĝo, instigis kelkajn samideanojn, ekrigardi malantaŭen kaj studi la pasintan kvarcent-jaron de nia lingvo kaj movado.

Do lastatempe aperis tre bonaj resumoj pri la historio de Esperanto, verkita de s-ro Ladeveze, Fiŝer kaj Zakrzewski. Antaŭ ni kuŝas nun la preta unua parto de simila verko.

Ankaŭ s-ro Privat studis la materialon, troveblan en la unuaj libroj, gazetoj k.t.p., tre zorgeme, kaj la rezulton de sia laboro li prezentas en maniero tre interesa.

Montrinte, kia estas la rolo de Esperanto inter la hindo-eŭropaj lingvoj, la aŭtoro rakontas pri la „Deveno de Esperanto“ laŭ atesto de Doktoro Zamenhof, li priskribas la aperon, de la unua „Lernolibro“ kaj de la „Dua Libro“ kaj li pentras la esperon, kiun baldaŭ poste vekis en d-ro Z. la Amerika Filozofia Societo, ekinteresiĝinta pri la nova lingvo internacia. En sekvantaj ĉapitroj ni sciiĝas pri la unuaj adeptoj, pri la unua gazeto la „Esperantisto“ kaj pri la reformema agitado, kiu, feliĉe, ne prosperis disbati la unuecon. Pluaj paĝoj estas dediĉitaj al la „Franca propaganda Societo“ kaj al la influo de L. de Beaufront inter la esperantistaro. Fine en la lasta ĉapitro ni legas pri la dis-

vastiĝado de Esperanto en Ruslando kaj pri la interna ideo kaj spirito de nia lingvo.

Ĉar sinjoro P. tute ne estas seka kronikisto, sed historiisto, scianta ĵeti faskojn da propra lumo sur la stud-objektojn, do lia „Historio de Esperanto“ estas libro tre leginda kaj pripensinda.

Ni volus ankaŭ atentigi pri la stilo, kiu ĉiam estas laŭ-fundamenta, klara kaj libera de ĉiaj strangajoj.

A. G.

Das Esperanto ein Kulturfaktor. Festschrift anlässlich des 7 deutschen Esperanto-Kongresses Danzig-Zoppot vom 27 Juli bis 1 August 1912. Heraus gegeben im Auftrage des Deutschen Esperanto-Bundes von Dr. R. Ledermann, Augsburg. Kommissions-Verlag von Ader und Borel, Esperanto-Verlag. Dresden — A. 1, Struvestrasse 40. Paĝoj 212. Prezo 1 Sm.

Por la granda energio kaj la organiza talento de niaj germanaj samideanoj oni devas havi respekton. Kiel gravan postsignon de sia bonege sukcesinta sepa kongreso ili lasas grandan, belege eldonitan libron, kiu estas verkita per „unuigitaj fortoj“ de tridek plej kompetentaj agantoj sur la kampo de esperantista propagando en Germanujo. En tridek artikoloj ili pritraktas, ĉiu laŭ sia specialeco la plej diversajn branĉojn kaj manjerojn de esperanta propagando, instruado, organizado kaj defendado. Ni trovas do en la verko tre interesajn opiniojn kaj utilajn konsilojn pri propagandoj: buŝa, skriba, demonstra, per festoj, ekspozicioj, en kurac- kaj banlokoj ktp.

